

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-RO 523

MAJO 1949

LA "EPOKO" LIBROJ

Serio de interesaj romanoj por la distra horo

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie.
El la angla tradukis "Etulo".
183 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** Francisko Molnár.
El la hungara tradukis L. Spierer.
108 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse.
El la angla tradukis G. Badash.
185 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
4. **La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells.
El la angla tradukis E. W. Amos.
180 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
5. **Princino de Marso.** Edgar Rice Burroughs.
El la angla tradukis K. R. C. Sturmer.
181 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
6. **Colomba.** Prosper Mérimée.
El la franca tradukis Prof. J. Beau.
184 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj aŭfrankite.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi.
El la hungara tradukis L. Spierer.
148 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj aŭfrankite.
8. **La Virineto en Bluo kaj aliaj rakontoj.**
Originale verkitaj de Mason Stuttard.
150 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj aŭfrankite.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Ĉu ni daŭre perdadu la fruktojn de nia laboro? Tezo diskutenda de ĉiu E-grupo. Mendu, sendante 2 intern. respondkuponojn, ĉe Esperantista Klubo, Teplice, Ĉeĥoslovakujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Nudul(in)oj, duonnudul(in)oj sur poŝtmarkoj! Legu jarlibron 1949, paĝ. 13.

A. Marinović, Janjina-Pelješac, Dalmacio, F.N.R.J., Jugoslavujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj baze de katalogo Zumstein kaj Yvert. Nepre respondas.

Du lernantinoj deksesjaraj deziras korespondi tutmonde. Certa respondo. Silvana GHIGORNO, Via Pioppi 7, Milano, Italujo; Sandra PENOTTI, Via Grosseto 1, Milano, Italujo.

S-ro Pablo Farnés, deziras korespondi pri folkloro, bibliografio, alpinismo, k.t.p. Paz 32, Tarrasa, Hispanujo.

Kiu Anglo aŭ Amerikano volas interŝanĝi ilustritajn gazetojn, precipe *Life* kaj *Picture Post* kaj ilustritajn poŝtkartojn kun ĉeĥoslovaka Esperantisto? Vladimír Vurm, Doudlebská 896, Ĉ. Budejovice, Ĉeĥoslovakujo.

Psikiatroflegisto deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj gazetojn kun gesamideanoj de la tutmondo. Feliciano Marques, Hospital Julio de Matos, Lisboa, Portugalujo.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj Jaroslav Bayer, 27-jara konstrua teknikisto, Kolonia Vistra 1219, Bratislava, kaj Vojta Kithier, 35-jara konstrua teknikisto, Kolonia Vistra 1226, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo. Certe respondos.

15 gekursanoj, 16-50 jaraj, deziras korespondi kun la tuta mondo. Skribu al Slovaka Esperanto-Klubo, Uherské Hradiště, Ĉeĥoslovakujo.

F-ino Ruzena Vilémová, komercistino, Uherské Hradiště, Ĉeĥoslovakujo, deziras korespondi kaj interŝ. il. poŝtkartojn kaj gazetojn kun la tuta mondo. Certe respondos.

S-ro Horacio Santos, Rua Guarará 581, São Paulo, Brazilo, deziras korespondi kun la tuta mondo poŝtkarte aŭ letere. Respondo garantiita.

Glumarkojn, poŝtkart-novaĵojn, diversajn vest-insignojn por respondkuponoj aŭ alivaloro sendas Koro Esperantista, Bašty 6, Brno, Ĉeĥoslovakujo.

Fraŭlino H. Christine Taylor, Glenview, Wascoe Street, Leura, N.S.W., Aŭstralio, deziras korespondi kun gesamideanoj ĉie. Certe respondos.

Oficisto mezaĝa deziras korespondi kun gesamideanoj tutmonde. Mi ankaŭ volas konvinki kontraŭulojn, ke Esperanto estas praktike tutmonde uzata. St. Miksztal, ul. Parkowa 10, Wlochy (Warszawa), Polujo.

Spertajn kursgvidantojn por la sezono Septembro 1949 —Majo 1950 serĉas Norvega Esperantista Ligo, Box 942, Oslo, Norvegujo.

Letervesperon aranĝos 17an de Julio la grupo en Mansfield. Skribu al la sekretario, 3 Beech Avenue, Mansfield, Anglujo. Nepre respondos.

Eusebio Pons, Nápoles 235-4-I, Barcelona, Hispanujo, serĉas seriozajn gekorespondantojn, precipe el Azio, Afriko, aŭ Aŭstralio. Korespondas per leteroj kaj poŝtkartoj il. Respondo garantiata.

S-ro Max Slaney, 43 Mahoe Street, Te Awamutu, Nov-Zelando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn, k.t.p. kun ĉiuj landoj. Mi nepre respondos.

30 ge-esperantistoj deziras korespondi kun tuta mondo. Skribu al Karlo Toman, Mlada Boleslav-pod, Chlumi 94, Ĉeĥoslovakujo.

Haringojn peklitajn en bareloj deziras eksporti Esperanto Komerca Servo, 98 rue Cas-Delavigne, Le Havre, Francujo.

Magnetismo elhoma (magnetizo saniga); pri tiu temo deziras korespondi Bosc, 98 rue Cas-Delavigne, Le Havre, Francujo.

Monda Tribuno

Internacia gazeto por

kulturo, literaturo, scienco kaj tekniko

Eldonita en Aŭstrujo

Monate

Grandformata

Jarabono : 8 ŝil. anglaj

★

Abonebla ĉe U.E.A., Rickmansworth

LERNU ESPERANTON

de

DANIEL QUARELLO

Libro-serio por niaj verkistoj,
tradukistoj kaj literaturamantoj.

I. Lernu Esperanton

II. Komplementoj de l' Substantivo

Prezo, afrankita po lŝ. 4p. por ĉiu libreto.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

VIZITU

LA INTERNACIAJN FERIAJN

KURSOJN EN HELSINGØR,

DANLANDO, 17-25 JULIO

Sub aŭspicio de UEA.

Petu prospekton de S-ro L. Friis,

Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

42a JARO

Majo 1949

N-ro 523 (5)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £5 : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

La Enkonduko de Esperanto

Kiel okazos la enkonduko de nia lingvo? Tio estas demando kiun faris al si jam multaj batalantoj. En la frua tempo de la organizita movado la opinio pri la povo parlamenta en demokrataj ŝtatoj estis granda kaj ni mem kredis, ke sufiĉos parlamenta decido por antaŭenpuŝi nian aferon. Ĉi tiu kredo estis infano de sia tempo kaj estus nejuste hodiaŭ primoki post farita sperto niajn antaŭulojn. La estiĝo de Ligo de Nacioj post la unua mondmilito donis egan impulson al la espero, ke ĉi tiu supera instanco serioze konsideros la demandon de internacia lingvo. Senutile estas reveni al ĉi tiu ĉapitro de nia movado, kies malgrasa rezulto estis la akcepto de Esperanto kiel klara lingvo en la telegrafio.

Malgraŭ la negativa fino de la traktado pri Esperanto antaŭ la forumo de la Ligo de Nacioj, la klopodoj pri alia procedo atingi eventuale partan sukceson ne haltis. La plej sukcesplena taktiko tiam ŝajnis esti la tielnomita Internacia Esperanto-Akordo. La baza ideo estis, ke pluraj ŝtatoj plej interesitaj pri la demando, interkonsentu pri prova instruado de nia lingvo en difinita lernejo-tipo kaj je la fino prezentu konkludan raporton. Ĉi tiu konkludo, ankaŭ laŭ difinita skemo, respondu definitive pri certaj punktoj tiom lingvaj kiom pedagogiaj. La politika ŝanĝiĝo en Eŭropo en 1933, sekvata poste de la dua milito, metis finon al ĉi tiu klopodado.

La Ligon de Nacioj anstataŭis la Unuigita Naciaro, pli kompleta organizaĵo sed malpli homogena ol la estinta Ligo. Pli rapide vidiĝis la manko de kohero inter la ŝtatemembroj. Koncerne la lingvan situacion diversaj teknikaj kombinaĵoj ne tiom sentigis la nesufiĉecon de lingva interkompreno kaj aliaj multe pli urĝaj problemoj ŝarĝis la posteulon de la Ligo de Nacioj. Necesis tamen altiri la atenton de la UN al Esperanto kaj tion plenumis la Petskribo, kuniganta milionojn da subskriboj por montri la intereson pri internacia lingvo. Okaze de la supozebla ricev-konfirmo kun kelkaj afablaj vortoj, ni ne malesperu. Aliaj problemoj de sama aŭ pli granda graveco devas suferi saman sorton.

Estos al la kompetentaj instancoj de la movado studi novajn eblojn.

H.J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstrujo

De Graz ni ricevis dupaĝan dense skribitan tekston pri la nunjara Aŭstria Esperanto-Kongreso, kiu okazos en tiu urbo, 16-20 Julion. Sub protekto de la Provinca Landestro de Stirio, kaj de la Urbestro, ĉi tiu manifestado promesas esti bonega pro la diversaj aranĝoj, interalie *Stiria Vespero*, folkloro festo unuaranga, ekskurso al la fama Lurgroto proksime de Peggau k.a. La krono de la kongreso estos inaŭguro de "Esperanto-placo" kaj la eldono de oficiala poŝtmarko.

Ĉiuvendrede la radio *Alpenland* dissendas Esperanto-kurson kaj ĉiun unuan ĵaudon de la monato aŭdiĝas la *Voĉo de Esperanto* el Graz. Utilus sendi multnombre dankesprimojn al la radiostacio (vidu Radiokalendaron).

Brazilo

La Esperanto-Klubo ĉe Y.M.C.A. en Rio-de-Janeiro daŭre bataladas por la enkonduko de Esperanto en ĉiujn Y.M.C.A.-ojn de la mondo.

Novajn kursojn oni inaŭguris, okazas regulaj kunvenoj kaj ĉiuvendreda *Vendreda Akademio*. Oni havas konstantan kontakton kun Y.M.C.A.-filioj en kelkaj landoj, sed deziras pligrandigi la reton. Tial kristanoj kaj anoj de Y.M.C.A. skribu al la adreso: Caixa Postal no. 254, RIO-DE-JANEIRO, Brazilo.

* * *

S-ino Zilá Nicolich da Silva, de la Departamento Estadula de Estatística, en Florianópolis, Brazilo skribis al S-ro Trygve Lie, ĝenerala sekretario de UNO por peti subtenon por Esperanto. Respondante franclingve, la ĉefo de la sekcio por komunikaĵoj kaj registroj, S-ro E. D. Brodau, sciigis, ke la respondeco por levado de la demando pri Lingvo Internacia ĉe UNO estas ĉe la Landaj Reprezentantoj, ke estus senutile flanke de UNO oficiale enkonduki Esperanton, se neniu el la delegitoj povus paroli aŭ kompreni ĝin. Li plu diras, ke se iam la plimulto de la delegitoj en UNO kapablos uzi lingvon internacian laŭ la propono farita, la demando pri oficiala alpreno solvos sin mem.

Komento superfluas.

Egiptujo

Novaj Esperantaj kursoj estas fonditaj en Cairo kaj la lokaj samideanaj multe klopodas por propagandi nian ideon. Franclingva gazeto *Journal d'Egypt* publikigis longan kaj tre favoran artikolon pri Esperanto, kun ilustraĵoj. La revuo *Images* donis fotojn pri prelego kaj demonstracia leciono sur siaj paĝoj.

Francujo

La 13-an de Marto okazis en Commentry (Allier) inaŭguro de strato Zamenhof. Tre multaj homoj ĉeestis, kiam la vicurbestro, S-ro Raquin, memorigante la pacemon de la urba magistrato, simboligitan per la ceremonio, oficiale malfermis la straton.

Farinte la kutiman geston je malkovro de la stratŝildo, S-ro Chagnoux, Prezidanto de Esperantista Centro, Montara Federacio, Komitatano de U.E.A., dankis kaj per varma parolo rakontis la vivon kaj laborojn de Zamenhof.

Interese estas memori, ke la urbo Commentry, en la fino de la pasinta jarcento, elektis la unuan socialistan deputiton en la franca deputitejo. Tiu estis nomita la *Kitela Deputito* pro tio, ke kieniam volis formeti, eĉ por iri al Parizo, la kamparanan kitelon, kiun li kutime portis.

Germanujo

Krom la ĉiujara kongreso Esperantista, ĉi-jare en Göttingen, okazos dum la tradicia "Kiel-a Semajno" 19-27 Junion, la Nord-germana Esperanto-tago 25-27 Junion. Oni antaŭvidas diversajn publikajn manifestojn kaj la loka Esperanto-Societo kore invitas samideanojn, precipe el norda Eŭropo, partopreni la feston en Kiel.

Hispanujo

En la urbo Reus, organizita de la loka Esperantistaro kunlabore kun gravaj katalunaj samideanoj, kaj en la kadro de la loka kultura asocio *Centro de Lectura*, okazis 23 Okt. ĝis 1 Nov. Esperanto-Ekspozicio kiu estis la unua en Hispanujo post la fratmilito 1933-39. La ekspozicio estis tre sukcesa, allogante multe da vizitantoj kaj vekis denove en la urbo grandan intereson pri Esperanto, precipe inter la junularo.

Gravan helpon faris S-ro Enrique Aguadé Parés, prezidanto de la menciita Centro de Lectura kaj iama prezidanto de Kataluna Esperanto-Federacio. Propagandis flugfolioj, loka radio-dissendo kaj loka gazeto *Lérida*.

Hungarujo

La 6-an de Marto la membroj de Hungarlanda Esp. Societo kun partopreno de provincaj delegitoj kunvenis en Budapeŝto. La nova ĉef-sekretario, S. Papp, deklaris, ke la societo povas labori nur se ĝia programo akordiĝas kun tiu de la registaro. La kunveno akceptis rezolucion, ke H.E.S. aliĝas al la nun fondita tutlanda Demokrata Popolfronto, kiel kulturorganizaĵo. Oni decidis klopodegi, ke la laboro de la societo povu okazi tute en la kadro de la sindikatoj sub patronado de la Landa Sindikata Konsilantaro.

Italujo

La Torina Esperanta Grupo montris eksterordinaran aktivecon en la lasta tempo, kaj rezulte de tio, oni komencis 18 kursojn, kun 600 lernantoj! Pli da kursoj estas preparataj.

La nomita grupo faris kontakton kun la Eŭropa Federacia Movado kaj unu rezulto estas, ke tiu movado faris favoran rezolucion pri Esperanto, kiu inkluzivas deziron, ke la Regiona kaj Nacia Kongresoj ekzamenu la problemon de lingvo internacia, kaj enkonduku ĝin en siaj oficialaj rilatoj. La Torina Grupo de tiu movado anoncas kurson de Esperanto.

Norvegujo

Esperantista ferio okazis en Norvegujo jam du sinsekvajn jarojn kaj ĉiufoje la aranĝoj estis tre sukcesaj. Pli ol 100 gastoj el 9 landoj povas rakonti pri la neforgeseblaj tagoj en Lofthus, Hardanger.

Ne estas strange, ke la Esperantistoj bonfartas en Lofthus, ĉar pli idilian lokon por somera restado oni ne povus deziri. La restadejo kiu estas popola altlernejo, situas sur altaĵo ĉe la mirinda Hardangerfjordo 75 km. oriente de Bergen kaj 30 km norde de Odda. La ferio ĉi-jare okazos de la 15-a ĝis 22-a de Aŭgusto. Estu bonvenaj!

Pollando

Kulturdomo de Profesiaj Sindikatoj en Krakovo enkondukis en sian kulturprogramon la instruadon de Esperanto. Oni dissendis al ĉiuj fabrikejoj kaj fakorganizaĵoj invitilojn pri organizata kurso. La solenan malfermon de la kurso, 15-an de Marto, partoprenis la direktoro de la Kulturdomo por prezenti preleganton Prof. Sygnarski, lektoron de Esperanto en Universitato Jagellona. Poste 60 homoj sin enskribis por la kurso. Gratulojn oni direktu al: Dom Kultury Związków Zawodowych, KRAKÓW, Rynek Główny 27, Pollando.

En Radom, industria urbo kun 800,000 loĝantoj, agadas vigle filio de la landa asocio. Pli ol 300 personoj partoprenis kursojn post la milito kaj por la Petskribo la grupo kolektis 55,000 subskribojn. En Radom U.E.A. havas 15 anojn inter kiuj estas 7 MS.

La 15-an de Februaro ministro de Kulturo kaj Artoj, S-ro Dybowski, akceptis delegitaron de la Ĉefa Estraro de la Asocio de Esperantistoj en Pollando, konsistantan el prezidanto S-ro Edward Bugajski kaj ĝenerala sekretario S-ro Isaj Dratwer. La ministro tre favore traktis la problemon de lingvo internacia.

Delegitaron akceptis ankaŭ la vicministro de Klerigado, Wilhelm Garncarczyk, arda simpatiulo de nia movado. Krom la cititaj aŭdiencoj la

delegitaro vizitis kelkajn gravulojn en la Ministerioj de Eksterlandaj Aferoj kaj de Kulturo kaj Artoj. Tiuj ĉi paŝoj grave helpas al la disvastiĝo de nia movado en Pollando.

Okaze de la Unuiĝa Kongreso de la Laboristaj Partioj en Varsovio, en 12 kluboj ĉe fabrikejoj kaj entreprenoj okazis prelegoj pri Esperanto. Plejparte prelegis S-ro Boleslaw Czechowski.

Sur la ekrano de la tagĵurnalo *Zycie Warszawy* (*Vivo de Varsovio*) troviĝanta ĉe la plej vigla strato de la urbo, dum du demajnoj estis anoncitaj kursoj de Esperanto.

Lastatempe tre malmultaj Esperantistoj skribis al la Pola Radio, Varsovio, kiu regule disaŭdigas interesajn kaj variajn programojn. Tiu stato minacas al la pluaj disaŭdiĝoj en Esperanto. Oni tial skribu multnombre al la radiostacio. En la programoj ofte troviĝas artikoloj kaj komunikoj pri kulturo, sociaj, politikaj, esperantaj problemoj. Ofte ankaŭ oni dissendas polan muzikon kaj deklamadon de pola poezio en Esperanto.

La Ĉefestraro de A.E.P., Marszałkowski 81, Varsovio, petas materialon por ekspozicio.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Clouser. Al Ges-roj Benn E. Clouser en Maple Heights, Ohio, Usono, je la 30a de Marto 1949 naskiĝis filino Martha Gaylord Clouser.

Roose. Al Ges-roj Fernand Roose en Brugge, Belgujo, je la 18a de Marto 1949 naskiĝis filino Randi.

Edziĝoj

Browne-Lippert. Je la 5a de Marto 1949 geedziĝis W. H. Browne, Londono, kun Mary Lippert, el Vieno.

Geryk-Mazlova. Je la 17a de Aprilo 1949 geedziĝis D-ro Jan Geryk kun Zorka Mazlová, en Praha, Ĉeĥoslovakujo.

Gousseau-Normand. G.-R. Gousseau, delegito en Mouvaux, Francujo kun F-ino M. Normand.

Niaj Mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

Bunston, S-ro John. Je la 1a de Aprilo 1949 forpasis nia membro John Bunston, en Londono.

Engelmann, S-ro A., en Rosny-sous-Bois, Francujo. Fidela ano de U.E.A., plurjara patrono de la estinta I.C.K., mortis en Februaro, 1949.

Lorand, D-ro Leo, mortis en Budapeŝto la 5an de Marto. Li estis unu el la plej maljunaj Esperantistoj kaj ludis gravan rolon en la Hungara movado, precipe en ĝiaj unuaj jaroj.

Rousseau, S-ro Célestin. 1861–1949, mortis Januaron. Esperantistiĝinte en 1902, Rousseau apartenis al la franca stelaro Esperantista de la heroeca epoko, kaj lia nomo estas ligita al la unua serioza faka vortaro, la fama *Vademecum de la Internacia Farmacio*. Modesta kaj konstanta karaktero, la mortinto multe klopodis en sia faka medio por nia afero kaj aktive partoprenis la enlandan movadon ĝis la vivofino. La Franca Unio Esperantista nomis lin Honora Komitatano.

PRI NEOLOGISMOJ

Okazas kun la helpa Esperanto same kiel kun la ceteraj vivantaj lingvoj—oni povas dupartigi ĝin je popola kaj altnivela.

La popola venkis popole, estas hodiaŭ komuna lingvo en multaj sektoroj, aksiome pruvita en konferencoj kaj kongresoj de miloj da esperantistoj de dekoj da landoj, praktike sin montranta kiel realaĵo, al kiu nur mankas la registaraj sankcioj por esti la dua lingvo de la mondo.

Esperanto estas precipe popola, nur ĝi posedas popolajn kvalitojn.

Ĉiam kelkaj sciencistoj verkis lingvajn pensaĵojn por aliaj sciencistoj, ne por la popolo. Tiu ĉi devas gajni siajn vivrimedojn, havas nek tempon nek paciencon por pensi pri internaciaj lingvoj.

Tiaj verkoj, celantaj ĝeneralan internaciecon, devas aliri al la popolo, ne la popolo al ili; devas, kiel unua kondiĉo, celi kaj logi la popolan atenton por vekti kaj kapti ĝian intereson.

Trarigardante ĉiajn provojn pri internacia lingvo, ni konstatas ke nur Esperanto enhavas tiun vivigan kapablon.

En la altnivela flanko, tiu de la sciencistoj kaj precipe de la beletristoj, okazas foje pridiskutoj, kiuj aspektas iomete strangaj al la neelito gapanta antaŭ la neoportunaj neologismaj bataletoj.

Kial ne, neologismoj ?

La proza kaj poezia beletroj bezonas ilin; tio neniel malutilas la facilecon kaj logikon de lingvo, kies vivpovo kaj artikhavo vivas strukture de ĝia fundamento. Esperanto daŭrigas ĉiam sian internacian rolon kiel helpa lingvo, prave elektita inter centoj da ili por la delonge ambiciita internacia uzado.

Esperanto havas sian propran evoluon, kiu ne nur rigardas novajn ideojn kaj esprimojn, kiuj povas kapti kaj dissemi la senton kaj la sencon de la diversaj naciaj idiotismoj.

Esperanto posedas rimedojn, kiuj iam igos ĝian literaturon la plej bela, ĉarma kaj riĉa en la mondo.

Kontraŭ la aserto de Meillet, ke *arta lingvo estas necesa al la prezentado de faktoj kaj ideoj, sed, pro sia propra strukturo, estas netaŭga al la literaturo*, mi asertas ke Esperanto firme marŝas al literaturo ĉiopova, riĉesprima kaj tutbela.

Tiel kiel okazas kun la naciaj lingvoj, la altnivela Esperanto rajtas ekzisti, devas ekzisti, ĝi akompanas la altan civilizon, do necesas neologismoj.

Certe ĝi estas—kaj pli amplekse estos—ĉiutaga utilo de la popolo, apartenas pli al la popolo ol

al iu ajn, sed sciencistoj, beletristoj, la altkulturitoj ankaŭ bezonas ĝin, ankaŭ rajtas, per Esperanto, vidi siajn elpensaĵojn, siajn verkojn, la rezultatojn de sia laboro, diskonitaj kaj por tio estas necese ke la terminaro helpu.

Eĉ, per Esperanto, tiuj altranguloj iom post iom pliproksimiĝas al la popolo kaj tiu ĉi, per Esperanto, iom post iom pli fide kaj scivoleme proksimiĝas al ili, akceptas ilin. Esperanto estas la plej taŭga ligilo inter kulturo kaj nekulturo; ankaŭ, sub tiu aspekto, ĝi estas la plej mirinda interkunfratigilo. Nur Esperanto povas okazigi tiajn miraklojn.

La Esperanto de unuj kaj aliaj estas malsama, sed estas ĉiam kaj fundamente Esperanto. Iuj ĵonglas la gramatikajn regulojn, aliaj uzas ilin tute senatenteme; la elito emfazas, la popolo simple skribas kaj parolas; iuj traflugas belstilajn ĉirkaŭdirojn, la aliaj nur celas la interkomprenigon.

La altnivela Esperanto apartenas al la amantoj kaj kulturistoj de la beletristika kaj scienca flankoj de la lingvo, al tiuj kiuj deziras ĝin penetri, disvolvigi kaj riĉigi; la popola Esperanto estas tiu kiu ambicias la Normalajn Lernejojn, apartenas al la unuagrada instruado, estas la kerno de la paco, la mentoro al kunfratiĝo, la sindona amiko de la internacia popolo.

Laŭ mi Esperanto rajtas riĉiĝi kaj neologismo ne estas koboldo.

Kaj nia Akademio de Esperanto tute ne estas kontraŭ la enŝovo de neologismoj en nian vortaron.

Ĉu ĝia rolo ne estas akcepti, kontroli, purigi, ordigi tiajn aferojn ?

Saldanha Carreira

LEGOLIBRO POR SUPERAJ KURSOJ KAJ MEMKLERIGO

de Ivan Sarafov

232 paĝoj, broŝ.

Prezo 7 ŝil., afr. 6p. (30 rpk.)

“Agrable impresas la objektiva prezento de materialo, kiu estas samtempe instrua kaj interesa.”

Eldonita de

Bulgara Esperantista Kooperativo

Mendu ĉe U.E.A.

ENCIKLOPEDIOJ KAJ ESPERANTO

Moderna homo, kiu volas esti bone informita, ĝenerale sin servas per Enciklopedio, kiu kompletigas la ordinaran prilingvan vortaron. Tio estas signo de certa kulturnivelo, ke individuo posedas tian Enciklopedion, kaj estas indiko pri alta kulturo ĉe malgranda popolo se ĝi povas aperigi tion en la propra lingvo. Riĉe dotitaj estas la nacioj kun granda nombro da popolanoj, ĉar la grandaj kulturlingvoj posedas plurajn tiajn verkojn, redaktitajn laŭ malsamaj vidpunktoj. Krom la ĝenerala Enciklopedio traktanta plimulton de la homa sciado, ekzistas la specialaj aŭ fakaj, ekzemple la *Enciklopedio de Esperanto* aperinta en du volumoj kaj kiu estas nove redaktata de la subskribinto.

La malico de la tempo malebligas ĝis nun la realigon de alia ideo, nome tiu redakti kaj aperigi enciklopedion ilustritan laŭ la franca *Petit Larousse* ekzemple. Ĝi estus kvazaŭ kompletigo kaj etendigo de la *Enciklopedia Vortaro de Esperanto*.

Tamen ne pri tio celas precipe la nuna artikolo. La nacilingvaj Enciklopedioj traktas nature ankaŭ la internacian lingvon kaj Esperanton. La tekstoj plejofte konformas al la faktoj, iafaje tamen ne! Kaj tiurilate restas por ni atentinda tasko: ekzameni la novajn eldonojn de nacilingvaj Enciklopedioj pri artikoloj *Internaciaj lingvoj*, *Mondhelplingvoj*, *Mondlingvo*, *Esperanto* k.s. Kaj se oni renkontas nelaŭfaktan informon, atentigu konvene la redakcion en bone dokumentita maniero pri tio.

Inter la Enciklopedioj de malgrandaj nacioj la svisa (en germana lingvo), kreita pro la malobjektiveco de la germanlingvaj Enciklopedioj dum la (pasinta) Tria Regno, enhavas tre bonan tekston pri ĉi tiu afero. Kvankam tre konciza, ĉi tiu artikolo povu servi kiel modelo por similaj verkoj. Ĝi tekstas (tradukite):

Mond-helplingvoj, arte konstruitaj lingvoj, kiuj servu al la internacia trafiko. Protagonistoj estas Comenius, Descartes, Leibnitz; antaŭuloj estas la pasigrafioj. La unua mondhelplingvo, kiu atingis pli grandan disvastiĝon, estis *Völapuk* de Pastro J. M. Schleyer (Konstanz 1879). La plej grandan uzadon trovis *Esperanto* de D-ro L. L. Zamenhof (Varsovio 1887). Aperis pri ĝi proksimume 2000 instrulibrooj kaj vortaroj en 84 lingvoj, 2500 jarkolektoj de periodaĵoj kaj 3500 verkoj beletraj k.s. La Esperantistoj kreis multnombrajn organizaĵojn (vidu **Hodler H.**) kaj aranĝas ĉiujare kongresojn. La 32-a kun 1300 anoĵ 1937 en Bern.

Esperanto estas enkondukita en multnombrajn lernejojn kaj radiostaciojn, la internacia telegraf-konferenco akceptis ĝin kiel "klaran lingvon". Ĝi estas uzata en komercaj ĉambroj, internaciaj kongresoj kaj institucioj. Inter la ŝtatoj, kiuj akcelas la enkondukon de mondhelplingvoj, ekzistas silenta interkonsento konsideri nur Esperanton, ĉar alie la ideo iĝus sensenca (Komparu raporton de la Ligo

de Nacioj 1922). La aliaj projektoj havas nur teorian signifon. Citindaj estas: *Ido* reformita Esperanto (Paris 1907), *Occidental* de Edgar de Wahl (Reval 1922), *Novial* de Jespersen (Kopenhago kaj Londono 1928). La plej nova projekto estas *Mondial* de H. Heimer (Lund 1947). Ĉiuj mondhelplingvoj havas similan konstruon sur bazo de la romanĝermana, parte ankaŭ slava, vortaroj, kaj plej grandan gramatikon kaj fonetikan simplecon.

(Ĉi tiun artikolon sekvas listo de verkoj, utilaj por studado de la demando).

Parolante pri Enciklopedioj sen cito de la hispana de *Espasa* estus grava manko. Ĉi tiu, eble la plej ampleksa tia verko (74 volumoj) donas tradukon de ĉiu vorto tradukebla, en ses lingvoj kaj inter ili Esperanto! Idealo ja estus, se foje la plej konataj Enciklopedioj imitus la sistemon de ĉe tiu hispana kunfrato.

Hans Jakob.

Kompletige al la antaŭa artikolo, la verkinto invitas samideanojn en landoj kie aperis Enciklopedio, respondi la ĉi-subajn demandojn kaj se eble ensendi kopiaĵon de la teksto kun traduko. (Esceptitaj estas Enciklopedioj brita, franca, germana, kiujn ni konas).

Demandaro

Koncerne tekston pri Esperanto en nacilingvaj Enciklopedioj.

Nomo de la Enciklopedio:

Lasta eldono:

Teksto pri:

- | | |
|----------------------------------|-------|
| (a) Lingvo Internacia (ĝenerale) | paĝo: |
| (b) Mondlingvo(j) | paĝo: |
| (c) Esperanto | paĝo: |

Nomo de la verkinto (se ĝi estas konata) de la artikolo:

Adreso de la redakcio de la Enciklopedio:

La detalojn bonvolu sendi al S-ro H. Jakob, Universala Esperanto - Asocio, Palais Wilson, Genève, Svislando.

SYNNØVE SOLBAKKEN

Bjørnstjerne Bjørnson


Plaĉa Norvega rakonto tradukita de
Edith kaj August Weide

2ŝ. 3p. aŭ 9 rpk, afrankite

Mendu ĉe U.E.A.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



*Curso Práctico de Esperanto:

de D-ro Ferenc Szilágyi, adaptita de Jorge Hess por hispanlingvanoj. Eld. The Esperanto Publishing Co., Ltd.

100 p. 18×12 cm. broŝ. prezo 2 ŝil. 6p., afranko 2p.

Denove aperas la konata libro de d-ro Szilágyi, ĉi-foje adaptita al plua lingvo, la hispana. De antaŭ kelkaj jaroj grave mankis al hispanlingvanoj bona lernolibro, pro kio oni kore bonvenigas la aperon de ĉi tiu libro.

Detala recenzo ne necesas post la aperigo de la antaŭaj eldonoj por alilingvanoj. Oni nur ripetu, ke la libro, pro ĝiaj bonega aranĝo kaj bonhumoraĵoj, taŭgas egale por grup-studado, izoluloj kaj koresponda kurso.

Per la eldonado de ĉi tiu libro, The Esperanto Publishing Company Ltd. kontribuas valoran apogon al la movado en hispanlingvaj landoj, malgraŭ la fakto, ke nuntempe estas preskaŭ neeble fari pagojn el suda Ameriko kaj tute neeble el Hispanujo mem.

W. M. Goodes.

***Fonto de l'Vivo:** El la Sankta Biblio. Kristana Esperantista Eldonejo, Hällabrotet, Svedlando. 64 p. 18×12 cm. broŝ. Prezo 1ŝ. 6p., afranko 2p.

Kolekto da elĉerpaĵoj, kiuj prezentas, sen komentario aŭ klarigaj notoj kelke de la plej gravaj instruoj el la Malnova kaj Nova Testamento. La valoro de tiaj kolektoj ofte estas dubinda, ĉar peco elŝirita el sia kunteksto iaforte perdas iom de sia signifo. Kvankam kelkaj el la pecoj en ĉi tiu kolekto tiel suferas, tamen la plimulto estas zorge elektita, kaj povas esti eltirita sen troa perdo de signifo aŭ valoro. Plejparte ili prezentas instruon, kiu ne bezonas komenton.

Por tiuj, kiuj ne posedas la Biblion en Esperanto, kaj ne konas la Zamenhofan tradukon de la Malnova Testamento, la libreto estas akirinda; ĉar inter la pecoj el la Malnova Testamento troviĝas ne nur la plej gravaj, de la religia kaj morala vidpunktoj, sed ankaŭ kelkaj el la plej belaj, de la vidpunkto literatura.

Estas evidente, ke oni tre kompetente redaktis la libron. Zorga tralego kaj kontrolo montris, ke ĝi estas fidela al la originalo. Tamen *Mirinda Konsilisto* p. 14 devus esti *Mirinda, Konsilisto*; *ili rapide dehakiĝas, kiel la* p. 25 devus esti *ili rapide dehakiĝas, kaj kiel*; *dezirojn tiajn, kaj dronigas* devus esti *dezirojn tiajn, kiaj dronigas*. La ceteraj—tre malmultaj—preseraretoj ne ĝenos la leganton. Klare presita sur bona papero.

John S. Dinwoodie.

***Ferio kun la morto:** orig. verkis Karl Lindqvist. Eld. Dansk Esperanto-Forlag. 21.8×15.4 cm., 71 p. broŝ. prezo 4ŝ. 6p., afranko 3p.

Malgraŭ la iom repela, melodrameca desegno sur la kovrilo de ĉi tiu nova verko, oni volonte legas por konstati, kion proponas por nia regalo la nova originala verkisto en Esperanto. Jam stimulas nian avidon la informo, ke K. Lindqvist estas konata verkisto en la dana lingvo.

S-ro Lindqvist faras sian Esperantan debuton per detektivromano. Li scias krei interesajn situaciojn kaj la interparoloj estas viglaj kaj verŝajnaj (arto, en kiu niaj verkistoj malofte sukcesas en Esperanto). Lia elstara talento tamen estas ĉe priskriboj—kun filozofiemo—de karaktero, kaj pri pejzaĝoj. Bonaj ekzemploj troviĝas respektive sur paĝoj 8–9 (pri maljuna fraŭlino) kaj en la Enkonduko.

La romano—kiel detektivrakonto—ne estas elstare bona, sed fakte iom naiva laŭ konstruo kaj donas la impreson, ke la aŭtoro verkas en fremda medio. La intrigo iaforte tro rapide kaj antaŭmature elvolviĝas (ekz. en ĉap. IV la simpla foresto de persono, ĉiutaga okazaĵo, neniel rajtigas la inspektoron tuj paroli pri murdo), kaj la rimedo—cetere specialaĵo de multaj tiufakaj verkistoj—kaŝi (!) la krimulon en la persono de la malplej suspektinda rolulo, perfidas la ruzon preskaŭ tuj, almenaŭ tiel estis por mi.

La lingvo, portante la stampon de kontrola komitato de F.L.E., estas bona kaj igas la libron rekomendinda por kursfinintoj. Mi volus atentigi nur pri unu uzo, kiu tuŝas principon, la konstantan “okupata” kiu ne konformas al la difino pri tiu vorto, donita de Zamenhof en *Lingvaj Respondoj*.

Ni salutas nian novan kolegon kaj esprimas la esperon, ke li venontfoje donos al ni verkon malpli trivialan. Al la eldonistoj mi petas, petegas, iom pli da bongusto je elekto de desegnoj por la bindaĵoj de iliaj libroj.

M.S.

***Scienca Revuo. Vol. 1, N-ro 1.** Oficiala organo de I.S.A.E. Jarabono 9 ŝil.

Recenzi periodaĵon estas nekutima faro nia, kaj oni ne supozu, ke ĉi tiu precedenco povos esti pravigo por ĝeneralaj petoj tiutemaj. La eldono de ĉi tiu revuo estas eksterordinara okazaĵo kaj meritas specialan mencion. Ĉi tiu unua numero konsistas el 40 paĝoj da seriozaj artikoloj presitaj sur bona papero. Ĝi aperos kvarfoje en la jaro kaj la eventuala jarkolekto mem konsistigos altvaloran sciencan verkaron. Jam en la unua numero troviĝas pluraj fakaj tezoj, kaj kelkaj el la teknikaj esprimoj certe povus naski diskuton dum la resto de la jaro. Inter la temoj ni legas:

Religiologio (W. Jezierski), *Vorto kaj Penso* (G. Mannoury), *Alvoko de japanaj medicinaj studentoj*, *La Dekuma Klasado* (R. Haferkorn), *La historio de D.D.T.* (E. S. Johnson—T. L. C. Bluett), *Diskuto pri terminoj* (W. P. Roelofs), *Formuloj en esperantaj revuoj* (J. Giltay) kiu ankaŭ verkis pri: *Rimarkoj pri la funkcioj de Euler, la faktora funkcio kaj binomaj nomaj*, inter aliaj aferoj. Vera regalo, kiu bonaŭguras por la estonteco.

M.S.

LA PETSKRIBO

Ni ne dubas, ke niaj legantoj atendas kun scivolo la ciferojn de nia Petskriba Kampanjo. Kvankam izolaj folioj fluetas en la C.O. ni povas doni malnetan ideon pri la rezulto. En la nuna momento la granda cifero estas

15,588,062

kaj tiu cifero verŝajne ne multe ŝanĝiĝos. Ni donas ĉi-sekve la vicojn de la respektivaj landoj kaj kaptas la okazon por esprimi la dankon, kiun sentas certe la tuta Esperantistaro al la diligentaj, senlacaj kunlaborantoj, kiuj povis produkti tiom imponan ciferon.

Pro limigo de spaco ni rezignas doni la detalojn pri la okupoj kaj ni ankoraŭ ne povis fari ĝustan kalkulon pri la divido inter unuopaj kaj kolektivaj subskriboj. Tiujn detalojn ni publikigos poste kaj cetere sendos tre detalan analizon al ĉiuj kunlaborintaj organizaĵoj.

Landoj

Germanujo ..	7,061,765	Usono ..	9,456
Japanujo ..	1,994,174	Argentino ..	7,138
Ĉeĥoslovakujo	1,201,154	Urugvajo ..	6,229
Nederlando ..	1,096,999	Portugalujo	3,740
Britujo ..	1,014,247	Aŭstralio ..	3,376
Aŭstrujo ..	796,489	Svislando ..	3,069
Norvegujo ..	560,021	Novzelando	2,540
Polujo ..	521,831	Egiptujo ..	2,299
Finnujo ..	346,390	Grekujo ..	2,050
Francujo ..	247,882	Maroko ..	1,336
Brazilo ..	244,089	Ĉinujo ..	539
Svedujo ..	175,991	Palestino ..	538
Italujo ..	75,589	Kanado ..	487
Belgujo ..	65,306	Ĉilio ..	485
Hungarujo ..	61,504	Irlando ..	474
Islando ..	28,349	Hindujo ..	409
Bulgarujo ..	21,992	Sudafriko ..	310
Jugoslavujo	17,477	Hispanujo ..	276
Danujo ..	11,267	Ceteraj lokoj	795

sumo 15,588,062

Lastmomente : 15,898,170.

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso

Ĉiutage	15.30–15.45	Praha. 1935m. kaj 25.34m. I.
	18.15–18.30	Paris. 48.39m. Radio-diffusion Francaise, 118 Champs-Elysées, Paris 8.
	19.00–19.15	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
Dimanĉo	21.00–21.15	Praha. 31.41m. P.
	23.30–23.35	Budapest Kossuth. 549.5m. I. Budapest VIII, Bródy Sándor u.7.
Lundo	07.15–07.30	Sveda Radio. 49.46m., 31.46m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	11.30–11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	15.15–15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Diversaĵoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.00–22.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan lundon).
	23.30–23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
Mardo	01.15–01.30	Sveda Radio. 49.46m., 31.46m.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neungasse 28, Bern.
	14.15–14.30	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan mardon. Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	17.40– ?	Bern. Kiel je 11.55, plus 19.60m.
	20.45–21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	22.00–22.10	Ostrava. 259m. Radiostacio Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato.)
Merkredo	10.15–10.35	Paris. 431.7m. K.
	20.10–20.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	23.30–23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.45–18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	17.45–18.00	Wien II. 31.05m., 41.81m. kaj 228.6m. K. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	17.40– ?	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	20.50–21.00	Praha. 470.2m (kiel je lundo).
	22.00–22.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	22.00–22.15	Graz 338.6m. I. (nur la unuan ĵaŭdon). Radio Graz, "Esperanto Voĉo" Zusertalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
	17.15–17.30	Graz (detaloj kiel ĉi-supre sed ĉiuvendrede).
	17.30–17.45	Hilversum II. 415m. P. (Nur 3.6.1949).
	23.30–23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

RAYANNE—la mirindulino



Tiuj Esperantistoj, kiuj havos la bonŝancon viziti la U.K. en Bournemouth, ĝuos apartan specialaĵon je Rayanne en la Varieteo; kaj oni jam ne miros, ke oni nomis ŝin la *Mirindulino de la Mondo*.

La misteraj kaj konsternaj faroj de Rayanne devas esti vidataj por esti kredataj, sed eĉ tiam oni restas en dubo pri la vero de tio, kion oni vidis.

Renkontante Rayanne, oni tute ne povus kredi, ke ŝi posedas apartan mistikan potencon ĉar en ordinaraĵoj ŝi estas simila al kiu ajn ordinara, normala Angla fraŭlino. Ŝin ne influas la laŭdo, kiun oni esprimas pri ŝi, kaj ŝiaj gustoj kaj manieroj estas simplaj, kvankam Rayanne havas viglan intereson pri la vivo kaj pri ĉio kio okazas.

Nur kiam oni detale rigardas al Rayanne oni ekkomprenas, ke ĉi tie estas io eksterordinara. Oni diris, ke ŝi estas bela. Ŝi ankoraŭ estas juna kun blankaj dentoj kaj blondaj haroj. Plej elstara trajto tamen estas ŝiaj okuloj. La koloro ŝajne ŝanĝiĝas kun la humoro; ifoje oni ĵurus, ke ili estas malhelbluaj, alfoje ili aspektas grizaj kaj jen denove avelkoloraj, kaj kurioza fenomeno estas, ke la okuloj de Rayanne povas influi proksimumojn tiel, ke ili sentas sin jen bonhumora, jen malgaja, jen antaŭtimeta, sed ja neniam

indiferenta.

La nomo, *Mirindulino de la Mondo* estis donita al Rayanne de la Usonaj soldatoj dum la pasinta milito, kiam ŝi servis kun la Usona Ruĝa Kruco—Varietea Sekcio, precipe en hospitaloj. Rayanne faris preskaŭ 20.000 prezentojn antaŭ soldatoj kaj kreis mondrekordon per 34 prezentoj en unu tago en la 79-a Ĝenerala Hospitalo, Netley apud Southampton. La meznombro de 23 prezentoj ĉiutage baldaŭ fariĝis objekto de admiro kaj miro en la ĉefejo de la Armea Ruĝa Kruco.

Certe estas, ke la leganto jam scivolas, kion faras Rayanne?

Jen mallonge ŝia prezento: Oni invitas anojn de la publiko ekzameni bandaĝojn kaj kiam ili estas kontentaj, ke neniu povus travidi ilin, oni bandaĝas la okulojn de Rayanne. Se oni ne estas kontenta, oni povas provizi la proprajn bandaĝojn. La publiko tiam decidas pri la pozicio, kiun Rayanne okupos, ĉu fronte al ili, ĉu malfronte, ĉu flankstare. La pozicio tute ne influas Rayanne. Post tio la ĉeestantoj estas invitataj indiki objektojn, kiujn ili posedas kaj Rayanne tuj priskribas ilin. Ekzemple, Rayanne detale priskribas numerojn de monbileto, vojaĝbileto, ciferojn, literarojn k.s. Tre ofte okazas, ke homoj faras demandojn pri aferoj, kiuj devas esti antaŭe nekonitaj de Rayanne sed ŝi tamen tuj donas ĝustajn respondojn. Mirigas aŭskultantojn la rapido per kiu ŝi respondas, ofte antaŭ ol la demandanto finis la demandon!

Ankoraŭ unu prezenton, kiun faras Rayanne, estas elkateno. Ĉi tio estas specialaĵo en kiu partoprenas nur anoj de la publiko kaj Rayanne. Kelkaj personoj ekzamenas rimenojn, ĉenojn, boltojn, serurojn, ŝnurojn k.s. per kiuj ili poste katenas Rayanne. Oni ligas ŝin al metala kadro kun la brakoj disetenditaj, kaj la ŝnurojn ligantajn la brakojn tenas konstante po du membroj de la helpantaro! Sed malgraŭ, eĉ spite de, tiuj antaŭzorgoj, Rayanne pravas, ke ŝi eliras el la katenoj kaj reeniras en ilin.

Eksciinte pri la varieteo en la Kongreso, la administranto de Rayanne tuj sin turnis al la L.K.K. kun celo fari prezenton. Kiam oni klarigis, ke ordinara prezento ne taŭgus—pro la lingva barilo—Rayanne kaj ŝia administranto tuj deklaris sian intencon lerni Esperanton, ĉu ili faros la prezenton aŭ ne! Sub speciala gvido de S-ro Nicolaisen en Bournemouth, la duo faris tiom da progreso, ke post nur kelkaj semajnoj estis evidente, ke ili povos esti tute kapablaj fari sian prezenton por la diversnacia partoprenantaro de la 34-a.

Sekve, antaŭ la kongresanaro en Bournemouth, Rayanne faros la unikan prezenton, kiu jam mistifikis gereĝojn!

LA CIKORIO

La homoj de la antikva tempo havis belan kutimon, personigi homajn ecojn kaj naturajn aĉaĵojn. Pri unu kazo tia rakontas la sekvantaj linioj. Unu tia personigo estas la cikorio, plantaĵo, je kiu ligiĝas antikva legendo. Junedzinoj pro ĉagreno pri forestantaj edzoj atendis ilian hejmenvenon ĉe la vojrandoj. Kompatema di-patrino transformis ilin en kreskaĵon, la cikorion, kun bluaj floroj. La nomo diras: *mi atendas* (greke: *chorios*), kaj observante la hirtan kreskaĵon, oni havas la impreson, ke ĝi efektive atendas iun spitante venton kaj veteron.

La nomo cikorio eniris en la plimulton de lingvoj; iuj tradukis ekzemple la germanan en *Vegwarte* apud *Zichorie*.

La cikorio devenas de la Mediteraneo kaj estis konata jam de la antikvaj Grekoj kaj Romanoj. Ili jam konis la sanigan efikon kaj ŝatis ĝin kiel legomon. Supozeble ili ankaŭ kulturis ĝin. Teofrato (390-287 A.K.) ĝin citas en listo de manĝeblaj plantaĵoj, same la greka kuracisto Diaskorido (50 A.K.). Fama aŭtoro de farmakologio, kiu dum jarcentoj estis vojdirektanto, Horatio, parolas pri la cikorio kaj ankaŭ la verkistoj Columella kaj Virgilio. Plinio priskribas ĝin en la *Historia naturalis*. Ankaŭ la Araboj konis la plantaĵon. Dum la mezepoko Karlo la Granda rekomendis ĝian kulturadon. La plej frua desegnaĵo de la cikorio datas de la unua jarcento antaŭ Kristo.

Je manĝo de brusela aŭ cikoria salato, antikvo kaj mezepoko jam nin antaŭiris, ĉar ni manĝas efektive nur la junajn foliojn de la kulturita cikorio. Ĝia radiko, metita en sterkon kaj en mallumon, liveras la tre ŝatatajn delikatajn helflavajn branĉojn. La nomo *brusel* indikas nur la centron de tiu kulturado. La franclingva *chicorée* respondas al la botanika *cichorium intubus* kaj la *intubus* rezultigis la *endivion*, alian multe kulturitan specon de la cikorio, ankaŭ nomitan *cichorium endivia*.

La graveco de la cikorio tamen ne troviĝas en ĝia uzo kiel legomo kaj salato, sed en la fabrikado de la kafo-surogato (anstataŭaĵo). Por ĝi oni uzas la radikon el kiu fariĝas, post rafinprocedoj, la *cikori-kafo*, eŭfemismo en la vera senco de la ideo.

Kiam la kafo estis veninta Eŭropon la kafotrinkado estis lukso, kiun povis ĝui nur riĉuloj. Oni serĉis ian surrogaton kaj jam en la jaro 1592 la itala kuracisto kaj botanikisto Alpini (1553-1617) konstatis, ke infuzaĵo de cikori-radiko

plejmulte similas kafon. Pri la inventaĵo mem diversaj nomoj estas cititaj: iu David Timme (1698-1772) el Arnstadt en Turingio, krome brunsviga sinjorino citita en broŝuro aperinta 1773 en Bremen. Tiu sinjorino, kiel rakontas Gottlieb Förster, la verkinto de la broŝuro, "suferis de galŝtonoj kaj sanigis sin konsuminte preparaĵon el la radiko de la cikorio. Oni ankaŭ diras, ke ĉi tiu infuzaĵo povus tre bone anstataŭi la kafon." Laŭ tio la edzo de tiu sinjorino, von Heine, ricevis de la prusa reĝo Frederiko la Granda privilegion produkti tiun surrogaton de kafo industrie. La disvastiĝo de la cikori-kafo multe helpis la monopolon, kiun la prusa ŝtato kreis pri la kafo kaj kio ekstreme plimultekostigis ĝin. Sed la plej grandan disvastiĝon atingis la surgato danke al la Eŭropa blokado de Napoleono de 1806-1813. De tiam la rolo de la cikorio kiel kafo-surgato estas definitive fiksita. Jarcenton post tiu blokado la nombro de la cikori-fabrikejoj en Eŭropo sumiĝis je pli ol 500!

La kulturado de la cikorio sekvis tiun evoluon. Oni ĝin kulturas hodiaŭ en Belgujo, Francujo, Sud-Germanujo, Nederlando, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Polujo, ĉe en Sudafriko, Aŭstralio kaj Novzelandoj grandkvante. En Belgujo ekzemple, 6746 hektaroj estis uzataj por tiu kulturado antaŭ la dua mondmilito; en Germanujo 2305; en Ĉeĥoslovakujo 4963; en Polujo 1973 kaj en Francujo 6627 hektaroj.

La cikorio pro la longa radiko bezonas profundan grundon, argil-sablan teron kaj multe da sterko. Ĝi eltiras el la tero multe da saloj tiel, ke sama kampo povas esti duafoje plantata per cikorio nur post 6 aŭ 8 jaroj. Post la semado en Aprilo kaj Majo oni povas rikolti en Septembro. Post la rikolto oni lavas la radikojn, tranĉas kaj sekigas ilin en specialaj ejoj kaj fine ili estas rostataj en feraj ujoj kaj muelataj. En la fabrikado oni aldonas diversajn ingrediencojn inkluzive de daktiloj kaj oleo.

Ankoraŭ ne ekzistas bone bazita esploro pri la efiko de la cikorio-kafo sur la sanon. La kuracistoj ne estas favoraj al ĝi. Svisa kuracisto Sanderegger en medicina libro aperinta en 1874 (Terapio pri antaŭgardo de la sano) nomis la cikori-kafon *lavakvo*, *almozulkafo*, *dieta kaj ekonomia malbonaĵo*, kiu kune kun brando estas ŝlosilo por malfermi azilojn de almozuloj kaj malliberejojn.

Malgraŭ ĉio la cikorio venke kontraŭstaris kaj daŭre okupas sian lokon, ĉu pro la multekosteco de la kafo en iuj landoj, ĉu pro la kutimoj de la dommastrinoj aldoni *aromon* al la kafo.

Verkis François Hayotte.

INTERNACIA KONKURSO 1949

La ciferoj je la fino de Marto montras grandajn ŝanĝojn kompare kun tiuj je la fino de Februaro. De la “vosto” subite levis sin Jugoslavujo kaj per unu granda salto jen ĝi troviĝas la unua: gratulojn! Tiu ago povas esti inspiro al tiuj landoj, kiuj ĝis nun ne tre sukcesis.

Iom surprizas nin vidi tiom da landoj kun grandaj kvotoj tiel proksimaj al la 100%. Ke ili sukcesis en la unua kvaronjaro pagigi la plimulton el sia membraro estas bona aŭguro por la fina membronombro por la jaro, ĉar ju pli longe la membroj prokrastas des malpli ili emas pagi—ili emas prokrasti ĝis venonta jaro.

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo ..	1600	2080	130.0
2. Egiptujo ..	300	335	111.7
3. Portugalujo ..	700	735	105.0
4. Svedujo ..	4100	4139	101.0
5. Belgujo ..	1700	1526	89.8
6. Urugvajo ..	250	210	84.0
7. Svislando ..	1400	1115	79.6
8. Britujo ..	13000	10090	77.6
9. Aŭstralio ..	950	725	76.3
10. Usono ..	3000	2201	73.4
11. Polujo ..	4000	2815	70.4
12. Finnlando ..	2000	1385	69.3
13. Kanado ..	300	205	68.3
14. Sud-Afriko ..	250	170	68.0
15. Norvegujo ..	1300	850	65.4
16. Italujo ..	1600	1030	64.4
17. Nederlando ..	5400	3460	64.1
18. Germanujo ..	1600	1010	63.1
19. Islando ..	500	315	63.0
20. Argentino ..	900	535	59.4
21. Hungarujo ..	1800	1035	57.5
22. Brazilo ..	2000	1130	56.5
23. Francujo ..	6200	3154	50.9
24. Irlando ..	300	150	50.0
25. Danujo ..	3200	1480	46.3
26. Nov-Zelando ..	900	365	40.6
27. Palestino ..	400	160	40.0
28. Aŭstrujo ..	1000	350	35.0
29. Hispanujo ..	1200	330	27.5
30. Bulgarujo ..	1600	210	13.2
31. Ĉeĥoslovakujo ..	5300	375	7.1

Por ĉiu membro kiu pagas kotizon al U.E.A. por 1949 estas donataj poentoj laŭ la jena tabelo:

Asocia membro ..	1
Membro kun jarlibro ..	5
Membro-abonanto ..	10
Membro-subtenanto ..	15
Patrono ..	50
Dumviva membro (nova) ..	50

Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando, kiu montros la plej bonan progreson dum la jaro kompare kun la fiksita kvoto U.E.A. donos premion £10 (175 svisajn frankojn). Ĉiu delegito en la koncerna lando ricevos libropremion.

Zoologia Nomenklatur

Ne estas kutimo, ke aŭtoro respondas al recenzo pri sia verko, sed kiam *Verdano* en sia recenzo pri mia resumo pri la Polihetoj de la *Michael Sars*-ekspedicio 1910 (*Esperanto*, Marto 1949) skribis: “. . . . daŭrigo de la tasko de speciala nomado en Esperanto neniel valorus la penon” mi supozis, ke miaj argumentoj por tia nomado povus kalkuli kun iom da intereso.

Kiam Esperanto estos akceptita kiel la internacia lingvo en ĉiuj rilatoj, estos malpraktike kaj nelogike uzadi latinajn (aŭ pli ĝuste latinformajn, ĉar multaj ja estas grekdevenaj) nomojn sciencajn por la bestoj (animaloj). Krome mi spertis ke la natursciencistoj grandparte ne ŝufice regas la latinan lingvon, eĉ nur por uzadi ĝuste la nomenklaturajn vortojn, kaj la rezulto estas ofte terura.

Pro tiuj ĉi kaj aliaj kaŭzoj mi decidis ellabori sistemon, laŭ kiu la specialistoj pri diversaj animalaj grupoj povu transformi la ĝisnunan latinforman nomaron scienca en Esperantan. Provon pri tiu sistemo mi publikigis en la nomita resumo kaj en resumoj pri pli fruaj verkoj miaj. Traktaĵon pri la tuta sistemo mi intencas publikigi kiam ĝi estos plene ellaborita.

Oni do ne bezonos tuj ellabori la nomojn de ĉiuj ekzistantaj centmiloj da specioj, tion faros iom post iom la specialistoj pri la diversaj grupoj. Kaj oni ne havus du paralelajn listegojn de du-vortoj nomoj, temas nur pri donado de Esperanta vesto al la jam internacia latinforma nomaro, por fari ĝin pli logika kaj facile uzebla al estontaj Esperanton-sciantaj sciencistoj. La loko ĉi tie ne sufiĉas eĉ por resume klarigi la ĉeftraĵojn de mia sistemo, kiu ja cetere interesos precipe nur zoologojn.

Mi volas tamen atentigi ke la nomoj ĉi tie priparolataj devas ne esti konsiderataj kiel popularaj, temas fakte pri speco de scienca terminaro. Bestoj familiaraj al laiko bezonas flanke de precizaj sciencaj nomoj ankaŭ nomojn popularajn, ekz. hundo, kato, leono, pasero, k.t.p. Tiajn nomojn oni devas en Esperanto ĉerpi parte el la scienca nomaro, prefere en simpligita, unuvorta formo, sed precipe el aliaj vivantaj lingvoj. Tiu problemo havus multe pli da intereso por la ordinara leganto, sed mi ne havas okazon tuŝi ĝin hodiaŭ.

C. Støp-Bowitz.

Alvoko al biologoj

En Finnlando biologoj aĉetis al si aŭtobuson kaj ŝarĝaŭtomobilon (por tendoj, manĝaĵoj k.s.) kaj nun ĉiusomere rondvojaĝas Eŭropon. Tiuj biologoj estas plejparte liceaj instruistoj pri biologio kaj geografio. Por ili estas grave

koniĝi kun la naturaj kaj geografiaj cirkonstancoj en diversaj landoj per propra observado.

Tial, ke la biologoj ordinare ne bone regas fremdajn lingvojn, ili dum siaj vojaĝoj sentas la lingvajn barojn, kiuj tre malhelpas. Mi, kiel interesato, proponis, ke oni akceptu Esperanton kiel helplingvon kaj la propono trovis almenaŭ iom da intereso. Do nun estas grave, ke biologoj en ĉiuj landoj eksciuj pri la afero kaj agu laŭe.

Menciindaj estas la diversaj laborkampoj sur kiuj kunhelpi :

- (1) Rondvojaĝoj ĝenerale.
- (2) Persona kontakto inter diverslandaj biologoj (korespondado, interŝanĝo de naturobjektoj k.s.)
- (3) Interŝanĝo de biologoj dum la libertempoj inter du (eventuale pli) landoj ĉiufoje. Reciproka gastigado en la respektivaj landoj. Daŭro de restado 4-6 semajnoj. Efika esplorado de la koncernaj landoj, farata de la diversaj specialistoj, partoprenantaj la interŝanĝon. Poste en la hejma lando okazu ekspozicioj kaj kunvenoj pri la impresoj kaj rezultoj.
- (4) Fondado de internacia ligo de biologoj kun komuna periodaĵo.

Mi tial turnas min al ĉiuj Esperantistaj biologoj kaj admonas ilin al kunlaboro. Prezentu la aferon al vialandaj biologaj societoj. Por konvinki niajn biologojn pri la utilo de Esperanto mi insiste petas, ke vi skribu poŝtkarton al D-ro Jorma Soveri, Pietarinkatu 5 B, Helsinko, Finnlando. Li estas nia gvidanta biologo kaj interesiĝas pri Esperanto. Li konstata, ke jam ekzistas Esperantistaj biologoj! Plej rapide alskribu biologoj en Danujo, Germanujo (brita zono), Nederlando, Belgujo kaj Francujo ĉar la venontsomera rondvojaĝo okazos en tiuj landoj, kaj la nomita sinjoro mem partoprenos.

J. Vilkki, Somero.

ENIGMA KONKURSO N-ro 38


Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, Avenue Molière 20-A, BRUSSEL-Forest, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en Konkursoj N-ro 36.

N-ro 77 : Horizontale oni legas : omartastm, parboŝeli, abioraleo, leorelopp, aligatoro, aaradikup, kranorolo, roperetoŝ, azotovost.

N-ro 78 : agrafo, alegorio, apogeo, aprilo, argilo, epigrafo, epilogo, galero, galerio, galopo, garolo, gorilo, grifelo, leporo, parafo, pirolo, profilo, regolo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 34-a konkurso : S-ro J. Soyeur (Belg.) 96p. S-ro H. Westergaard (Dan.) 93p., S-ro Fr. Couwenberg (Belg.) 91p.



Enigmo N-ro 81 : Sesangulo. Ĉiu el la ses fakoj ĉirkaŭ numerita sesanguleto devas enhavi unu literon. Tiuj ses literoj formas vorton. La sagetoj montras la fakon, kie komenciĝas iu vorto, kaj la direkton, en kiu oni legu ĝin. La signifoj de la 19 vortoj estas : 1. kvanto ; 2. templo ; 3. imposto ; 4. floreto ; 5. juvelŝtono ; 6. tia artikolo povas influi ies opinion ; 7. senindulga ; 8. suferi pro manko de io necesa ; 9. tia planko ne lasas traguti ; 10. tia pruvo ofte sufiĉas ; 11. okulmembrano ; 12. akompani ; 13. moderna adjektivo koncerne Germanujon ; 14. tropika frukto ; 15. arkitektura stilo ; 16. ne plu neu ; 17. vertikala longa ŝtonpeco ; 18. vitra vazo ; 19. penante plaĉi.

Kiu povas sendi al mi novan kaj taŭgan serion de vortoj por ĉi tiu figuro ?

Enigmo N-ro 82 : Strangaĵoj. La sekvantaj kvin frazoj ĉiuj rilatas al du vortoj (la lasta, al kvar), kiuj ĉiufoje diferencas nur en la unua litero (konsonanto). La unuajn tri ensendis S-ro L. Vitali (Italujo).

1. Se vi mordas la unuan, el la buŝo fluas la dua.
2. Por rabi eliras la pli malgranda, por kapti la unuan eliras la pli granda.
3. Kun "s" ĝi naĝas en la maro, kun "k" ĝi flugas en la aero.
4. Ĉiuj ni portas la unuan, la dua ne portas la unuan.
5. La unua, de ĉiu estas kondamnata, La dua, de multaj volonte aŭdata ; La tria, birdeto, ofte vidata, La kvara, insekto ne tre ŝatata.

Nia Felietono :

KAPTITOJ SUR LA GLACIROKO

F. Omelka

IV. La akcidento (*daŭrigo*)

Ili klopodis iri tra la altaj neĝblovaĵoj kiel eble plej rapide. Fine ili atingis la celon. Payen malfermis la pordeton kaj ambaŭ rapide englitis internen.

“Kio okazis?” ili demandis kvazaŭ per unu buŝo.

Ambaŭ virinoj kaj ankaŭ la pacientoj rigardis ilin kun surprizo.

“Kial?” nekomprene diris S-ino Gibson.

“Kiu vokis ĉi tie pri helpo?”

“Neniu.”

“Dum la tempo, kiam vi forestis, neniu eĉ ĝemetis,” komunikis la stevardino. “Ĉu vi aŭdis ion?”

“Jes, iu dufoje vokis helpon.”

“En la aeroplano vokis neniu,” diris S-ino Gibson. “Do tio povas esti nur . . .”

“S-ro Bakker!” ekkomprenis Payen. “Ni aŭdis la alvokon tre klare.”

Ili denove eliris en la neĝventegon. Momenton ili aŭskultis.

“Heelpoon!” aŭdiĝis denove. Nun jam pli mallaŭte, pli longe, pli malespere.

Ili sekvis la direkton de la voĉo. De tempo al tempo ili haltis kaj aŭskultis. La vokado ne ĉesis.

Fine ili trovis lin. Li kuŝis en neĝblovaĵo, en kiun li penetris ĝis la kolo. La manoj plektiĝis malantaŭ la dorso. Li tiregis per ili, ŝiris, movegis sin, sed sensukcese. Li jam estis preskaŭ blua pro la malvarmo. Liaj malfermegitaj okuloj estis elokventaj atestantoj de la terurego, kiun li travivis.

Nur en la aeroplano li plene rekonsciigis.

“... ĉiam mi diris al mi, ke mi neniam denove flugos super nebulitan montaron,” li daŭrigis sian nefinparolitan frazon. “Sed nun mi volas tion ĵuri!”

“Do, kio okazis al vi, S-ro Bakker?” demandis la stevardino.

“Mi kredis, ke ni estis sufiĉe alte. Mi saltis. Mi volis delasi la paraŝuton, kaj en tiu momento mi konstatis, ke mi kuŝis en la neĝo. Bele, dorsflanke, enborite ĝis la ŝultroj, manojn sub la dorso kaj plektitajn kun la ŝnuregoj. Mi ŝiris per la tuta korpo, mi eniĝis ĉiam pli profunden, la

neĝo jam atingis mian mentonon, kaj tiam mi komencis vokadi. Por diri la veron, mi ne esperis, ke iu aŭdos min. Mi supozis, ke vi aŭ daŭrigis la flugon, aŭ estis ie frakasitaj.”

“Nu, vi travivis pli ol sufiĉe,” diris S-ino Gibson. “Kiel ankaŭ ni.”

Payen kaj la radiisto donis raporton pri la rezulto de sia esploro. Ili decidis esplori la aparatojn, fiksi la geografian pozicion kaj provi elsendi.

“Pri ĉio kulpas la mezurilo de alteco” diris mallaŭte la piloto. Ĝi trompis min je kvincen ĝis mil metroj. Ĝi montris kvarmil kvincent.

La radiisto kalkulis ion dum kelkaj momentoj ĉe la kompas. Poste li iris al la piloto kaj diris:

“Laŭ mia kalkulo ni troviĝas sur la kvardekseca grado norde kaj kvina grado oriente. Ĉu tio akordas kun via kombino?”

La piloto enpensiĝis.

“Laŭ la flugtempo ni devus esti jam pli malproksimen. Sed... tiu nebulo kaj vento... estas ja vere malfacile fari precizajn konkludojn. Tio povas esti.”

“Ĉu mi do elsendu tion?”

“Nenio alia restas al ni. Ni ja konvinkiĝis, ke ni jam ne povas fidi niajn aparatojn, sed kion alian ni povas fari?”

Dum la radiisto notis sur la paperon raporton por sia elsendo, Generalo Gibson dismetis sur la sidlokon detalan landkarton de Svisujo. Ĉiuj, kiuj povis movi sin, ariĝis ĉirkaŭ lin.

“Do, kie ni troviĝas, sinjoro generalo?”

“Se S-ro Bernier bone taksis la situacion, ni estas sur iu glaciroko inter montoj Combin kaj Collon en la Penin-Alpoj.”

Dume la radiisto jam klopodis kontaktiĝi kun la mondo.

“MAYDAY el aviadilo F-AKCS!”

“MAYDAY el aviadilo F-AKCS!”

“Mi petas, estu silentaj!” S-ino Gibson admonis la aron ĉirkaŭ ŝia edzo. “Oni jam elsendas!”

Radiisto Berniers aŭskultis. Post nelonge aŭdiĝis mallaŭte:

“F-AKCS, flugejo en Berno!”

“F-AKCS, flugejo en Berno!”

“Oni aŭdis nin!” kriis entuziasme Bakker.
“Ni venkis, ĉar . . .”

Suprenlevita fingro de S-ino Gibson ĉesigis pliajn esprimojn de entuzasmo. En profunda silento Berniers elsendis:

“MAYDAY! MAYDAY! MAYDAY! La aviadilo F-ACKS, kiu ekflugis je la dekdua horo en Romo por Parizo frakasigis je la dektria horo kvardek kvin minutoj en nebulo super la Alpoj. El la tuta nombro de dek du personoj, ok estas vunditaj. Aviadilo frakasita. Ni troviĝas sur glaciroko kovrita de dika neĝtavolo. Geografia pozicio proksimume kvardeksa grado norda latitudo, kvina grado orienta longitudo. Mi komutas!”

Ĉiuj rigardis la ruĝan lumon, preskaŭ nespirante.

“ANSWERING! ROGER MAYDAY!”

☞ Danke al Dio! Berno konfirmis, ke ili aŭdis la vokon pri helpo.

“Ankoraŭ ĉi tion!” S-ino Gibson donis al la radiisto papereton kun rapide skribita aldono:

“Provizoj de nutraĵoj por nur du tagoj!”

Kaj jam venis ankaŭ Payen kun plia sciigo. Li transdonis al Bernier kelkajn frazojn: “Sendu al redakcio de *Paris Soir*! Marcel Payen, atestanto en proceso pri Jean Daumal, revenas Parizon. Haltigu la proceson. Marcel Payen.”

La radiisto vokis trian fojon.

“F-AKCS! Sendu al redakcio . . .”

En tiu momento estingiĝis la ruĝa lumo en la sendaparato. Bernier eksilentis.

“Kial vi ne elsendas?” elspiris Payen.

La radiisto ne respondis. Momenton li esploris la aparaton. Poste li peze suprenlevis sin kaj per raŭka voĉo komunikis:

“Nia izoligo de la cetera mondo estas perfekta. Ĉiuj baterioj estas eluzitaj.”

Payen devis ekpreni la apogilon, por ke li ne falu.

V. Sur la glaciroko

S-ino Gibson agis kiel lerta kuracisto. Ŝi neniam supozis, ke ŝi uzos la spertojn, akiritajn dum la kelkaj unua-helpaj kursoj, en tiom eksterordinaraj cirkonstancoj. Ankaŭ la konoj, kiujn ŝi akiris kiel flegistino dum la milito, estis al ŝi tre utilaj.

Tutan nokton ŝi ne fermis la okulojn. La stevardino tre kompleze helpis ŝin. Ili ambaŭ havis la manojn plenaj de laboro. Jen ili devis ree purigi la vundojn, jen doni novan bandaĝon, jen denove kuiri teon. Ĉiuj vunditoj kondukis brave. Malgraŭ tio, ke ili suferis de netolereblaj doloroj—multaj bezonis kvietigajn injektojn, kaj ĉiuj fartus pli bone se ili povus komforte etendi

siajn membrojn sur libera lito, sed ĉi tie ili estis devigataj kaŭri sur primitivaj kuŝejoj, kunmetitaj el sidtabuloj—tamen neniu eĉ plendetis.

Ambaŭ donis al la pacientoj ĉiun eblan flegon. Kun anĝela pacienco ili trairadis la malgrandan spacon inter la du vicoj de kuŝejoj. Al ĉio ili respondis kun afabla rideto kaj neniel montris, ke ankaŭ ili estas lacaj.

“Vi devus dormeti, S-ino Gibson,” diris la stevardino je la matena krepusko, kiam ŝajnis, ke la malsanuloj jam iomete kvietiĝis.

“Vi tion bezonas pli, fraŭlino,” ridetis la maljuna sinjorino. “En mia aĝo dormo jam ne estas tiom altvalora.”

Kaj malgraŭ tio, ke la stevardino defendis sin, S-ino Gibson devigis ŝin iri dormi. Se oni povus nomi dormo la sidadon en malkomforta pozicio, kun la kapo plena de teruraj bildoj kaj maltrankviligaj sonĝoj

S-ino Gibson estis ne nur la kuracistino de la tuta ekspedicio, ŝi estis ankaŭ mastrumistino. Tuj antaŭ vespero ŝi detale kontrolis ĉiujn nutraĵojn en la aeroplano. Ili ja estis malesperige malmultaj; kelkaj panbuletoj, iom da salmo, pasteĉ-konservoj, ĉirkaŭ du kilogramoj da ĉokolado, sukero kaj teo. Oni neniel povis miri, ĉar neniu volis kunpreni provizon da nutraĵoj por tiom mallongedaŭra flugo, precipe se por ĉiu paketo oni devis pagi altan pagon. Sed kiom ajn ŝi klopodis, ŝi ne povis fari alian konkludon ol tiun, kiun ŝi lasis elsendi en la eteron: provizojn da nutraĵoj por nur du tagoj.

Por du tagoj! Kaj poste?

Denove kaj denove ŝi pripensis la tutan provizplanon. Sed ŝi apenaŭ konsoliĝis per la esperiga penso, ke al sanuloj estos eble iom rezigni pri porcioj, kiam ŝi denove konsterniĝis. Estas ja ĝuste, ke la sanaj estu pli modestaj; sed tion, kion ŝi tiamaniere gajnos, ŝi devos ja doni al la malsanaj!

Tio ĉi, espero kaj duboj, fido kaj malespero, interluktis nur interne. Ekstere S-ino Gibson estis nur kompleza, servema, preta helpi, afabla. Ŝi kovradis la malsanulojn, kiam ili tremis de malvarmo, ordigis al ili la kusenojn, konsoladis ilin per afablaj, patrinaj vortoj kaj kuraĝigaj ridetoj.

Tutan nokton tondris la sovaĝa ventego. Ĝi plenforte puŝegis la aviadilon, kiu krakis, ĝemis kaj tremegis. La neĝo, pelate je neimagebla rapido, frapegis la tegmenton de la aeroplano kaj gluiĝis sur la fenestroj de la kajuto.

Payen kun la radiisto kaj Bakker premiĝis en la pilotkajuto. Se S-ino Gibson bezonis ilin por iu malfacila tasko, ekzemple se estis necese turni malsanulon aliflanken, ili volonte helpis. Sed alie ili ne miksis sin en ŝian laboron.

Ili sidis senvorte kaj senmove rigardis en la densan mallumon. Eĉ Bakker, kiu alitempe estis tiom parolema, gaja kaj vivoplena, ne inklinis paroli. Li ne pensis pri la komerc-profitoj, kiujn li perdos, se li ne estos en Parizo. Li estis skuita pro la proksimo de la Morto, kies vizaĝon li posttagmeze de proksime rigardis kaj kiu, eble, ĉirkaŭiras la areton da malfeliĉuloj.

Marcel Payen ne povis rekonsciiĝi de la granda bato, kiun li ricevis dum la elsendo. Kiom malmulte mankis, por ke la sciigo por la redakcio de *Paris Soir* estu elsendata kaj transdonata! Kaj Daumal, lia fidela kunulo Daumal, povu esti savata! Li estus povinta senigi sin de la turmentaj imagoj kaj angoro, kiuj lin certe en la nunaj tagoj kaj noktoj obsedus. Kio ja konspiris kontraŭ li? Sed tamen eble ili estos savataj. Sed ĉu oni trovos ilin ĝustatempe?

Amaraj riproĉoj pikis lin. Kial li ne forsendis telegramon el Romo? Li havis sufiĉe da tempo. Sufiĉus nur kelkaj minutoj, dum li estis en la flughaveno. La oficisto certe volonte aranĝus la aferon. . . . Li ne povis antaŭvidi pereon. Cedate. Sed tio ne estis senkulpigo. Prudenta homo devas pensi pri ĉio; li devas antaŭvidi ankaŭ tion, kio ŝajnas neverŝajna. . . .

“Sinjoro Payen,” eltiris lin el la malĝojigaj pensoj la radiisto. “Ektagiĝas. Ĉu ni denove iru iom promeni en la ĉirkaŭaĵo?”

Ili tamen revenis post nur kelkaj paŝoj. La ventego furiozis ankoraŭ pli sovaĝe kaj pli ŝtorme ol hieraŭ.

Sekvis longa, senfine longa tago. La tuta konversacio turniĝis ĉirkaŭ unusola penso: ĉu oni sendos aviadilon por serĉi ilin!

“En ĉi tia vetero, certe ne,” diris Generalo Gibson, ne suprenlevante la kapon de la landkarto, kiun li ankoraŭ kun intereso studis. “Ĝis la ventego ĉesos kaj la nebulo suprenleviĝos, ni ne povos esperi, ke oni povus trovi nin.”

“Kiel longe tio povos daŭri?” Bakker demandis la radiiston.

“Unu, du aŭ plurajn tagojn.”

“La duan, jam estos en ordo,” provis rideti S-ino Gibson. “Ni esperu, ke la naturo faros al ni komplezon.”

Ĉiu uzis la tempon laŭ sia povo. Iuj legis jam kelkajn fojojn la malnovajn sciigojn en ĵurnaloj, aliaj ludis kartojn, S-ro Bakker fine ĉesis esti melankolia kaj rakontis novajn historietojn. Generalo Gibson estis ĉiam klinita super la detala landkarto de Svislando kaj ion mezuris kaj kalkulis.

Payen kun la radiisto provis ankoraŭ kelkfoje trairi la ĉirkaŭan regionon, sed la ventego ĉiufoje repelis ilin.

La dua nokto en la aeroplano estis ankoraŭ pli malfacila ol la unua. S-ino Gibson paliĝis, ŝiaj okuloj perdis sian brilon kaj ili kvazaŭ iomete enkapiĝis, sed la ridetoj, per kiuj ŝi kuracis pli efike ol per bandaĝoj, estis ĉiam la samaj; plenaj de kuraĝigo kaj kredo, ke ĉio finiĝos bone.

Matene la ventego subite ĉesis. La nebuloj suprenleviĝis kaj al la mirigitaj okuloj de la perditoj prezentis sin ĉarma, sed malkonsola panoramo. Kien ajn la okulo rigardis, ĉie troviĝis glacirokoj aŭ elstaris krutaĵoj de la montegoj. Nenie eĉ signo de la valoj kun dometoj de la svisaj montanoj aŭ signo de vilaĝeto aŭ urbo.

La perditoj konsolis sin, ke ili eble troviĝas sur unu el tiuj glacirokoj, kiuj jam proksimis de la valoj, ke ili ekvidos, eĉ se en malproksimo, homan loĝejon; ke sufiĉos doni nokte lumsignalon kaj ili estos savitaj. . . .

Nenio tia. Nur ondeca maro de la montegaj pintoj kaj glacirokoj. Kelkaj ankoraŭ estis kaŝitaj de la nebulo kaj malpeze fluganta neĝo; aliaj jam brilis en la matena suno. Ĝi estis panoramo, kiu turiston ravus. La perditojn ĝi plenigis per teruro kaj malespero.

(daŭrigota)

Grandskala praktika uzado de Esperanto

Sekve de persistaj klopodoj de kelkaj samideanoj la estraro de grava Franca eldonsocieto akceptis finance subteni realigon de ampleksa projekto, kiu ebligis praktikan uzadon de Esperanto.

Oni celas krei kaj komerce disvastigi ĉe la publiko diversspecajn amas-eldonaĵojn redaktitajn dulingve (franglingve kaj Esperante) kaj iafoje plurlingve.

Inter la projektoj de la entrepreno troviĝas novspeca multiplika tabelo *Rapida* (10.000 multiplikaj rezultoj sur unu paĝo), matematikaj, teknikaj kaj aliaj formularoj, portretserioj de famaj homoj kun biografiaj notoj kaj en formo de poŝtkartoj, citaĵoj kaj aforismoj k.s. elektitaj el religia kaj profana literaturo kaj arte prezentitaj, kaj diversaj kartludoj.

Oni serĉas jam nun kontaktojn en diversaj landoj por reprezenti la entreprenon kaj petas interesatojn sin turni al: Iniciata Komitato de Tramonda-Esperanto, 24 Fbg. de Riedisheim, MULHOUSE, Francujo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
OFICIALA INFORMILO

N-ro 216

4-an de Aprilo 1949

La jenaj informoj ne estas en la unua parto de la jarlibro 1949.

LANDAJ ASOCIOJ

Aliĝintaj

Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5, Zagreb, Jugoslavujo.
Slovenia Esperanto-Ligo, Cankarjevo Nabrezje 7-I, Ljubljana, Jugoslavujo.

Ne-aliĝintaj

Germana Esperanto-Asocio, Engelbertstr. 7, (13b) München-Pasing.
Irlanda Esperanto-Asocio, Ardan Maolthuile, Béal Atha an Fheadha, Co. Mhuighéo.

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Felixdorf/Sudbahn. D : J. Schwarz, Bräunlichstrasse 12.
Knittelfeld. VD : R. Pawlik, Stubalpenstrasse 33.
Wien. FD (Gazetaro) : G. Katzianka, Rossauerlände 27/4, Wien IX. Tel : A12-4-44.

Brazilo

São Paulo. FD (Bibliotekaj aferoj) : F-ino A. Levy, Caixa Postal 5888.

Britujo

Leeds. FD (Socikredito) : W. Townend, 125 Church Lane, Leeds 6. Tel : 53553.

Germanujo

Berlin 20. VD : W. Gieseler-Fischer, Forstweg 79, Berlin-Frohnau.
Oberstdorf. D : H. Wagner, Prinzenstr., Hs. Edelraute, Oberstdorf i. Allgäu.

Hispanujo

Tarrasa. VD : V. Garcia, Calle Valle 5.

Pollando

Przemysl. D : W. Sochatynski, ul. Jagiellonska 12.

Svedujo

Gävle. FD (Instruado) : A. Lenner, Byggmästargatan 15. Tel : 6807.
Lund. FD (Instruado) : O. Olsson, Bantorget 3.

ŜANĜOJ

Brazilo

São Paulo. FD (Ludilo-industrio) : A. Vass, Rua Rui Barbosa 97, ap. 9.

Britujo

Nottingham. FD (Junulgastejoj) : vakas.

Francujo

Mouvaux. D : vakas.

DUMVIVA PATRONO

S-ro N. Wooding, Leicester, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

- 269. S-ro W. A. Kerr, Te Awamutu, Nov-Zelando.
- 270. S-ro M. Fejde, Nässjö, Svedujo.
- 271. D-ro E. Olsson, Luleå, Svedujo.
- 272. S-ro D. R. T. Jones, Lampeter, Kimrujo.
- 273. S-ro K. Jense, Jönköping, Svedujo.

- 274. S-ro E. Mila, Drancy, Francujo.
- 275. S-ro M. Salzmänn, Villeurbanne, Francujo.
- 276. F-ino L. Borčić, Zagreb, Jugoslavujo.
- 277. D-ro A. Ingster, Sosnowiec, Polujo.
- 278. S-ro A. De-Parla, Szprotawa, Polujo.
- 279. S-ro J. Krzyzanowski, Łódź, Polujo.
- 280. S-ro J. Zawada, Warszawa, Polujo.
- 281. S-ro Z. Glajcar, Poznań, Polujo.
- 282. S-ro P. Dowejko-Krzymowski, Gdansk, Polujo.
- 283. S-ino B. Podgórska, Łódź, Polujo.
- 284. S-ro T. Trebacz, Szczecin, Polujo.
- 285. F-ino A. B. Howlett, Bushey, Anglujo.
- 286. S-ro D. J. Langman, Birmingham, Anglujo.
- 287. S-ro N. R. Smith, Swindon, Anglujo.
- 288. S-ro S. Helfgot, Buenos Aires, Argentino.
- 289. S-ro V. Alavedra, Tarrasa, Hispanujo.
- 290. S-ro E. Tudela Flores, Valencia, Hispanujo.
- 291. S-ro R. Martin, Casamance, Senegalo.
- 292. F-ino D. Andersson, Linköping, Svedujo.
- 293. F-ino K. Walden, Ystad, Svedujo.
- 294. S-ro J. Dastych, Chelmno, Polujo.
- 295. S-ro T. Hodakowski, Nowy Sacz, Polujo.
- 296. S-ro F. Kropielnicki, Gdansk, Polujo.
- 297. S-ro W. Birtwistle, Bournemouth, Anglujo.
- 298. S-ro W. T. Gayfer, Cleethorpes, Anglujo.

DONACOJ : S-ro Kilu 2ŝ., T. J. Gueritte 4ŝ. 6p., F-ino H. Wolff 5ŝ., O. K. Sutcliffe 10ŝ. E. Mila 10ŝ., R. Raynaud 6ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Atentu! Dum la kongresa periodo la oficejoj en Rickmansworth kaj Genevo estos fermitaj. Oni bonvolu klopodi, ke korespondaĵoj ne atingu la oficejojn dum tiu tempo. Antaŭdankon.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Marto, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Marto 1948 :

	1948	1949
Asociaj membroj ..	3986	3805
Individuaj membroj :		
MJ 640		545
MA 3656		3327
MS 291		298
Patronoj .. 20		15
DM 162		179
HM 55		57
	4824	4421
	8810	8226

CECIL G. GOLDSMITH, *Sekretario.*

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Serva Centro

Palais Wilson, Genève, Svislando

Enciklopedio de Esperanto. La subskribinto, siatempe komisiita de la eldonisto de ĉi tiu verko prepari la trian volumon, reprenis ĉi tiun laboron. Pri la apero de la nova Enciklopedio detala informo aperos pli malfrue. Dume la redaktoro metode prilaboras jam ricevitan materialon kaj post nelonge dissendos cirkuler-leteron al la Esperantistaj Landaj Organizaĵoj, kiel ankaŭ al individuoj, kun demandaro respondota.

Bonvolaj samideanoj, libervolaj kunlaborantoj, ĝenerale ĉiuj kiuj sin interesas pri ĉi tiu grava verko, ne domaĝu komuniki ideojn, proponojn, sugestojn al Redakcio de Enciklopedio de Esperanto ĉe la ĉi-supra adreso.

Esperantista interhelpo. El modesta kredito, kiun ni disponis, ni povis sendi ĝis nun al aro da samideanoj medikamentojn kaj nutraĵojn. Dum la pasinta Kristnasko 1948 kaj Novjaro 1949 ni sendis al 60 samideanoj donaceton konsistantan el kafo, kondensita lakto aŭ aliaj ŝatataj frandaĵoj (normala 500-grama sendaĵo). La samon ni faris al ankoraŭ 40 samideanoj en la pasinta Pasko. Pro elĉerpiĝo de la rimedoj ni momente ne povas daŭrigi tion, sed esperas ricevi monhelpon.

Ni denove atentigas, ke ni ne povas sendi ĉiajn medikamentojn, ĉu pro malpermeso eksporti, ĉu pro manko de kuracista recepto. Ni ne povas sendi, ekzemple, *streptomycinon* kaj iujn drogojn.


Datlimo por ESPERANTO. Por ke io aperu en la revuo *Esperanto*, necesas, ke la teksto atingu nin la 28-an de la monato por aperi en la postvenonta numero (28-an de Majo por la Julia numero). Konkizaj informoj estas preferataj kaj ne riskas atendi, sekve ne skribu detalege sed restu ĉe la simplaj faktoj.

Vizitantoj en Ĝenevo. La redaktoro de *Esperanto* pro multokupiteco ne povas akcepti vizitantojn, kiuj sin ne anoncis antaŭe. Palais Wilson, estante ŝtat-oficiala, ne estas vizitebla kiel ia privata domo. Sekve, okazaj vizitantoj ne miru pri la "malvarma" akcepto flanke de la administranto-redaktoro.

Genève, 28-an de Marto, 1949.

Hans Jakob, Redaktoro.

34-a Universala Kongreso de Esperanto Bournemouth, Anglujo 6-13 Aŭgusto, 1949



Adreso por leteroj : 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Kongresoj : La Urbdomo, Bournemouth.

Kongreskotizoj :

Kongresano	ŝil. 40
Edzo aŭ edzino de kongresano ..	ŝil. 20
Junul(in)o ne pli ol 20-jara ..	ŝil. 20

Kongreskarto : Tuj post ricevo de la aliĝo kaj kotizo, L.K.K. sendos al vi provizoran kongreskarton kun informoj kaj mendilo por loĝejoj kaj ekskursoj. Al informpetoj bonvolu aldoni internacian respondkuponon (Britoj, poŝtmarkon).

Limigo : Notu la jenan gravan informon pri aliĝoj al la Kongreso !

1. Pro la neeblo akiri pli grandajn kunvenejojn, ni devas limigi la nombron de gekongresanoj al maksimume 2,000, el kiuj ne pli ol duono estu Britoj.

2. Ĉiukoze ni **ne akceptos** kongresaliĝojn post la 1-a de Julio 1949, kaj nur ĝis tiu dato se estos liberaj lokoj konforme al la antaŭa paragrafo.

Aliĝoj : Ĝis la 5a de Aprilo aliĝis 1242 kongresanoj laŭ la jena tabelo : Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 7, Belgujo 24, Brazilo 2, Britujo 731, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakujo 7, Danujo 44, Finnlando 10, Francujo 139, Germanujo 7, Hispanujo 2, Hungarujo 7, Irano 1, Irlando 10, Italujo 17, Jugoslavujo 3, Kanado 3, Nederlando 39, Norvegujo 29, Polujo 3, Portugalujo 1, Svedujo 120, Svisujo 23, Usono 8.

Min ne amu (Anonima poeto)

Min ne amu gracio mia,
Pro mieno plaĉe simpatia,
Nek pro eksteraĵo eleganta,
Nek pro mia koro nun konstanta—
Tiuj, foriĝinte, eble povos
Inter ni, malamon flegi ;
Veran vidon de virino tenu :
Amu min, sed kial ne komprenu—
Tial kaŭzon vi ankoraŭ trovos,
Ĝis la morto min amegi.

*El angla tradukis
Brendon Clark.*

Spritaĵoj

Ekzistas multaj vojoj por riĉiĝi, sed la plimulto inter ni jam estus kontenta, se ĝi konus nur unu el ili.

* * *

Ne ĉiuj virinoj estas malfacile kompreneblaj ; multaj estas ĝenerale nekompreneblaj.

* * *

Patrino scias ĉion plej bone. Kaj patro nature ankaŭ, kiam Panjo detale ĝin klarigis al li.

* * *

Malriĉaj homoj havas nur malproksimajn parencojn.

* * *

Agrablaj najbaroj estas tiuj, kies infanoj jam estas plenkreskaj.

Ridu, ridu, kaj ankoraŭ ridu !

Donu al viaj infanoj—eĉ al plenkreskuloj—
azenon, hundon, ebriulon, leopardon, katon,
negretojn, bovinon—kun flekseblaj membroj.

La diversaj ludiloj estas moveblaj laŭ la
plej ridigaj pozoj kaj kreas senfinan amuzon.

Ne maltrafu ĉi tiun bonan okazon, mendu
tuj !

Prezo : po 8 int. respondkuponoj.

Martini Alberto,
Via Aleardi 38, Firenze, Italujo

Esperantista ferio en Norvegujo

De la 15a ĝis la 22a de aŭgusto vi havos
okazon pasigi libertempon en Lofthus,
Hardanger, la plej bela regiono de okcidenta
Norvegujo.

Pasintan someron 52 samideanoj el 9 landoj
ĝuis neforgeseblajn tagojn tie. Venu vi ĉi
tiun someron !

La restado kostas 125 n.kr. kaj la ekskursoj
25 n.kr. Ju pli frue vi anoncos vin, des pli
certe vi havos lokon. Jen la adreso :

Esperantista ferio, poŝkesto 132,
Haugesund, Norvegujo

ESPERANTISTO SLOVAKA

ilustrita monata Esperanto-revuo, redaktata
tute en Esperanto, unu el la plej interesaj
naciaj revuoj en Esperantujo, havanta legantojn
jam en ĉiuj mondpartoj, estas nun abonebla
pere de U.E.A.

Jarabono : 8 anglaj ŝilingoj por 12 numeroj.
Provnumero senpage ĉe

Esperantisto Slovaka,
Kuzmany-str. 29, T. S. Martin,
Ĉeĥoslovakujo

LA SUDA STELO

Oficiala organo de

Jugoslavia Esperanto-Federacio

Landaj informoj, literaturo, interesaj artikoloj

Dumonte : jarabono 6 ŝilingoj anglaj

Mendebla ĉe U.E.A.

GAJA LEGANTO PER ESPERANTO

de P. E. SCHWERIN

Spritaĵoj - Vortludoj
Preseraroj - Anekdotoj
Matematikaĵoj - Rimaĵoj
Societludoj - Demandaro
Konsiloj por Grupestroj
kaj Kursgvidantoj.

Prezo :

1 ŝil. 3 penceoj, afranko 1p.
aŭ 5 int. rpk. afrankite.

Eldonita de
ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.
Mendu ĉe U.E.A.

ELEKTITAJ RAKONTOJ

Elin Pelin


Traduko kaj klarigaj notoj de
Simeon Hesapĉiev

Prezo : 2 ŝil., afranko 2p. aŭ 8 int. rpk.



Eldonita de
Bulgara Esperantista Kooperativo

Mendu ĉe
Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Flugu, kiam vi vojaĝos! Pli rapide, pli facile kaj pli agrable oni vojaĝas per aviadilo. Kie ajn en la mondo vi estu, la vojaĝoficejoj povas aranĝi vian vojaĝon per SAS, kiu rekte komunikiĝas kun la grandurboj de la mondo kaj kontaktas liniojn etenditajn super la plej granda parto de la tero. La grandaj komfortaj SAS-aviadiloj faras eĉ longajn vojaĝojn plezuraj. Ili havas agrablajn seĝojn, kie oni manĝas la delikataĵojn donitajn de la skandinavaj aermastrinoj, kiuj servados unike al vi. Freŝa kaj bone ripozinta vi alvenos al via celo. Diru al via vojaĝoficejo, ke vi deziras flugi per SAS. . . . per SAS vi flugos en la unua klaso.

SCANDINAVIAN AIRLINES SYSTEM

ABA · DDL · DNL

